

Praha-ek-1971-01-01

BULTENO PRAHA 1971

- 1 -

Fondita en 1902

LOKA GRUPO
De ĈeĤA E-ASOCIO

1-a numero
januaro-marto 1971

VORTOJ DE LA PREZIDANTO

Karaj geamikoj!

Komence de la nova jaro ni deziras al ĉiuj klubanoj feliĉon, ĝojon kaj prosperon en ilia laboro. Tutkore ni dankas al ĉiuj kunlaborantoj, kiuj en lasta jaro helpis al ni en nia agado, kiu entute estis sukcesa.

Bedaŭrinde malgranda estis la aktiveco de nia junularo. Estas nepre necese akiri novajn junajn membrojn. Tio ĉi estas nia unua tasko en la nuna jaro.

Necesa estas ankaŭ aktiva helpo de niaj membroj por la programo dum la kunvenoj, por ke ili kontentigu ĉiujn partoprenantojn. Prepari bonan programon ne estas facila afero.

Nia grava tasko estas altigi Litvan nivelon de niaj membroj. Tial s-ano Slanina ankaŭ en la nova jaro preparos dekminutajn lecionojn en la komenco de ĉiu kunveno. Eluzu okazon kaj venu ĝustatempe!

Depencas de vi mem la ekfloro kaj la sukceso de nia klubo en jaro 1971. Ni forte bezonas viglan aktivecon ne nur de la gvidantoj, sed aktivecon de la tuta membraro.

D-ro R. Horský
prezidanto de la klubo

VŠEM NAŠIM ČLENŮM

Podle usnesení výboru 9. 11. 1970, vstoupil Klub esperantistů v Praze do Českého esperantského svazu, jako jeho místní skupina s právní subjektivitou. Vstup Klubu do Svazu byl předsednictvem ČES uvítán a schválen. Členové Klubu se stávají od roku 1971 zároveň členy Svazu. Činnost Klubu nebude nijak dotčena, naopak Klub se může ve své činnosti více opírat o právní autoritu a organizační i publikační činnost Svazu. Členové Klubu a Svazu budou postupně, tak jak za ně budou uhrazeny členské příspěvky, přijímáni za kolektivní (tzv. svazové) členy UEA v Rotterdamu a obdrží členskou legitimaci UEA, členskou známku s kupony pro služby delegátů UEA ve všech zemích.

Doufáme, že všichni členové Klubu projeví porozumění pro rozhodnutí výboru a stanou se plnoprávními členy celého esperantského hnutí, jak ve vlastním zájmu, tak i k podpoře dalšího rozvoje esperanta u nás i ve sféře mezinárodní.

Výbor Esperantského klubu v Praze
Prof. Dr. R. Horský – předseda
Architekt Jos. Drlík – jednatel

Pokladní zpráva

Klub má už 420 členů. K tomuto číslu přikládáme složenku, doufajíc, že počet členů bude dále stoupat. Pokud snad patříte k těm několika zapomnětlivým, kteří dosud nezaplatili svůj členský příspěvek za minulý rok (1970), máte tu příležitost zhostit se své povinnosti za oba roky najednou.

Příspěvky na rok 1971:

Členství v Českém esperantském svazu a v jeho místní skupině – Klubu esperantistů v Praze s odběrem jejich časopisů – STARTO a klubové – Bulteno – a v případě, že bude příspěvek zaplacen mezi prvními 1100 členy Svazu, také kolektivní členství v UEA.

Výdělečně činní	68,-- Kčs
Důchodci	44,-- Kčs
Studující	34,-- Kčs

Rodinní příslušníci a příznivci se stávají členy Svazu a Klubu bez odběru časopisů a nároku na kolektivní členství v UEA za 20,-- Kčs ročně.

Nově přihlášení členové platí jednorázové zápisné 10,-- Kčs.

Příspěvky můžete zaplatit osobně přímo v klubu. Ušetříte tím nejen poštovné, ale získáte i nové přátele a rozšíříte si své znalosti mezinárodního jazyka.

Programo en la unuaj kvar monatoj 1971 – program 1. aŝ 4. mĉs.

- | | | |
|-------|----------|--|
| 4.1. | B. Dryák | - Film – vespero (Fiat) |
| 11.1. | J. Mařík | - F. V. Lorenz kaj la unua lernolibro por ĉeĥoj. |
| 18.1. | L. Kynĉl | - Floroj en hejmo kaj ĝardeno. |
| 25.1. | B. Dryák | - Kvizo kun lumbildoj. |
-
- | | | |
|-------|--------------|--|
| 1.2. | Eli Urbanová | - Rilatoj inter homoj I. |
| | Inĝ. Felix | - Mezilidské vztahy I. |
| 8.2. | M. Josková | - Pri la libreto „La Papalagoj“
- O kniŝce „La Papalagoj“ |
| 15.2. | A. Šustrová | - Japanaj fabeloj.
- Japonské pohádky. |
| 22.2. | Eli Urbanová | - Rilatoj inter homoj II. |
| | Inĝ. Felix | - Mezilidské vztahy II. |
-
- | | | |
|------|---|--|
| 1.3. | Vespero de ĉeĥ-rumana amikeco, ĉesko rumunský přátelský večer
Belega muziko 53-
Krásná hudba 53-
Muzikas – Ĉeĥo-rumana trio
Úĉinkuje Ĉeskorumunské trio
Kantas: Vera Mora
Zpívá: prof. Vera Mora
Violono: ing. Karel Koubský (housesle)
Piano: prof. Miloslava Lařtůvková (klavír)
Emanuel Glombiĉek – emer. membro de teatro en Karlín
(emer.ĉlen divadla v Karlínĉ) | |
|------|---|--|
- | | | |
|-------|----------------|---|
| 8.3. | A. Zmeřkal | - Novaj libroj en biblioteko.
- Nové knihy v knihovně. |
| 15.3. | J. Vítek | - Gaja Josefa vespero.
- Veselý Josefský večer. |
| | s-ino Kubíková | - La vivo en Bulgario.
- Źivot v Bulharsku. |
| 22.3. | JARKUNVENO | - VÝROČNÍ SCHŮZE |
| 29.3. | O. Kníchal | - Vojaĝo al Japanio.
- Cesta do Japonska. |
-
- | | | |
|-------|---------------|---|
| 5.4. | A. Musilová | - Amuz-vespero
- Zábavný večer |
| 12.4. | Dro R. Horský | - Kvizo – Ĉu vi konas Eŭropon? kun lumbildoj.
- Kvíz – Znáte Evropu? s diapozitivy |
| 19.4. | L. Kynĉl | - Printempa laboro en ĝardeno.
- Jarní práce v zahradě. |
| | Arch. Drlík | - Naskiĝ-datreveno de V. I. Lenin.
- Výročí narozenin V. I. Lenina. |
| 26.4. | M. Plařanská | - Pri evoluo de farmacio en nia lando.
- Vývoj farmacie v naší zemi. |

SCIIGOJ EL NIA KLUBO! ZPRÁVY Z NAŠEHO KLUBU

Atentigo - Upozornění.

Ĉar ni devas foriri kaj forlasi nina ĝisnunan klubejon, la komitato de la Klubo baldaŭ sciigos vin pri la nova ejo.

Familio Ŝupichová kaj sinjorino Hejnová sendis al nia klubo leteron, en kiu ili esprimas koran dankon al prof. Dro. R. Horský kaj prezidanto de Asocio por iliaj belaj paroloj dum la kremacio kaj al multaj gesamideanoj kiun ĝin ĉeestis.

Ankaŭ ili dankas por la presita mortanonco kaj la flordonacoj de la Asocio kaj la Klubo.

La 14. de decembro 1970 okazis en la Praga E-klubo Zamenhofa vespero, en kiu festparolis la prezidanto Dro R. Horský. Interalie li komparis la homaranecajn kaj porpacajn ideojn de Zamenhof kun tiuj de J. Amos Komenský, la iniciativo de la universala lingvo, kies 300 jaran datrevenon depost lia morto rememoris pasintjare la tuta kulturista mondo.

La solenan programon plibeligis per solokantado da koloratura kantistino f-ino Hana Řípková kun akompane pianludo de s-ro Dro L. Řípa. En ĝuplena artprogramo estis prezentitaj arioj de J. Mysliveček kaj W. A. Mozart plenaj de voĉdelikateco kaj artisma ĉarmo.

Dignan omaĝon al Dro Zamenhof finis s-ano L. Kynčl per deklamo de „La preĝo sub la verda standardo“.

D. B.

Kurs esperanta pro začátečníky probíhá ve škole v Sázavské ulici za účasti 43 přihlášených kurzistů, členů klubu. Kurs vede zajímavým způsobem pan A. Slanina.

Ĉu vi scipovas Legi Esperante? Ĉu vi jam legis iun esperantlingvan libron ĝisfine? Se ne do hontu! Tamen la peko estas facile forigebla – en la Klubo estas ĉiulunde haveblaj multaj libroj kaj aliaj esperantaĵoj. Ĉi sube ni anoncas nur kelkajn erojn:

Ivan Sarafov: Legolibroj por superaj kursoj; 231 paĝoj	10,- Kčs
Svetoslav Minkov: La alia Ameriko – vojaĝo trans la ekvatoro; 112 p.	8,-- Kčs
Julian Tuwim: Poeziaĵoj; 130 p.	8,-- Kčs
Ĥristo Smirnenski: Tra la ventego; 80 p.	5,-- Kčs
Kalocsay-Waringhien-Parnasa: Gvidlibro; 158 p.	32,-- Kčs
Leteroj kun E-signo; 2 specoj – 10 ekz. po 3,-- aŭ po 5,-- Kčs	

VENU-VIDU-AĈETU-! Eksterprahanoj adresu siajn mendojn al: s-ino Anežka Šustrová, Dlouhá 10, Praha 1 – Staré město.

Profesoro Klement Urban 90 jara.

S-ro prof. Klement Urban naskiĝis 22. de novembro 1880 en Všemina apud Vizovice. Gimnazion li studis en Valašské Meziříčí. Depost la mezlernejo li ŝatis geografion kaj historion. Tiujn ĉi lernejobjektojn li poste profunde studis en la filozofia fakultato en Praha. Grave lin influis tiama prof. Aŭgustin.

Fininte la universitatajn studojn li profesoriĝis en la jaro 1905 li ekinstruis en Prostějov. Post kvar jaroj li transiris al mezlernejo en Litovel.

Dum la unua mondmilito prof. Urban ellernis la anglan kaj Italan lingvojn, sed nur pli poste li alprenis ankaŭ Esperanton.

Post la milito li daŭrigis la instruadon en Kyjov kaj depost la jaro 1924 li vivas en Praha, kie li estis profesoro en reallernejo en Ječná strato. S-ro profesoro emeritiĝis en la jaro – 1939. Dum tiuj longaj jaroj li multe verkis, precipe por la tiam tre konata geografia revuo – „Širým světem“, kies konstanta kunlaboranto li estis dum multaj jaroj. Li verkis fakajn artikolojn por la Geografio de Machát, aperinta en tri eldonoj, pri okcidenta kaj norda Eŭropo.

En la jaro 1927 li redaktis gravan verkon – „Čeňoslovakio en Bildoj“.

En 1930 aperis lia granda libro NIA MONTARO kaj en kunlaboro kun prof. Zpěvák aperis pluraj eldonoj de diversaj geografiaj lernolibroj.

Laŭ lia instigo estis verkita kaj eldonita KOLEKTO DE REGIONAJ GEOGRAFIAJ STUDAĴOJ.

S-ro prof. Urban ofte vojaĝis. Li vizitis Francujon, Skandinavajn landojn, - Sovet-Union, Britujon, Italujon, Rumanujon kaj aliaj landojn.

En Britujo li studis lernejsistemon, pri kiu li poste verkis artikolojn kaj ofte prelegis.

Por siaj vojaĝoj al eksterlando, li estis lingve kaj fakte tre bone preparita. Kiam s-ro prof. Urban ellernis la internacian lingvon, mi ne scias precize. Sed la unuan mencion pri uzo de Esperanto mi trovis en la 1-a n-ro de La Progreso (de la jaro 1931). Tie ni legas: „Mia vojaĝo tra Granda Britlando.“

Dum la jaroj 1947-1949 s-ro prof. Urban, kiel rekonita faklektoro prelegadis en Brno kaj Praha, pri metodiko en Geografio. Sed li profunde interesiĝis ankaŭ pri la bela literaturo kaj verkis nekutiman studaĵon: Rilato de geografio al bela literaturo. Krome li havas intiman rilaton al poezio. Sur tiu kampo ne nur legis la plej diversajn poeziajn verkojn, sed ankaŭ mem skribis poemojn. Se mi bone memoras, do ankaŭ en nia klubo ni foje aŭdis versojn el lia plumo. Al nia klubo li aniĝis en la jaro 1931. Ni estas fieraj, ke tia neordinara, klera kaj vaste konata fakulo pri geografio kaj historio estas membro de nia granda verda familio kaj aparte ni teras, ke s-ro prof. Urban estas nia membro de EKP. Ĉiam ege modesta li sekvas niajn ne unuklasajn programojn.

Permesu al mi, ke mi esprimu al s-ro profesoro Klement Urban niajn sincerajn dankojn kaj admiron pro lia taviva, por la socio tre grava laboro kaj okaze de lia – naŭdekjariĝo bondezirojn la plej varmajn. Ke li restu sana kaj bonfarta ankoraŭ multajn jarojn kaj ke lin ne forlasu forte fizikaj kaj spiritaj, kiuj estas esence – gravaj por la feliĉo de vivanta homo!

-FABA-

(Kompilita laŭ materialoj de Dro J. Kolář)

IV-a Mělník

Denove je la kvara fojo jam la 8-an de novembro renkontiĝis esperantistoj en la urbo de „bona vino“, Mělník, en kiu unu el aŭtunaj tagoj apartenas direble jam tradicie al amika renkontiĝo, aranĝata de la loka esperantista rondeto lerneja sub la gvido de Josef Vítek. Ĉirkaŭ ducent dudek personoj el pluraj lokoj, eĉ malproksimaj, ĝuis la komunan restadon kaj babiladon en la kastelo kaj en ties vinejo dum komuna tagmanĝo. Ĉeestis ankaŭ eksterlandanoj – unu el GDR kaj eĉ kvinopo el Aŭstrio, inter ili la konata s-ro Hubálek.

Al la alilandanoj, laŭdire ege plaĉis la sabatvespera programo, en kiu ili admiris la lertecon de la rondeta junularo – io malhavata en Aŭstrio. Tiun vesperon mi tamen ne ĉeestis. Ni Praganoj, alvenis tien dimanĉe per speciala, plene okupita aŭtobuso, kiun prizorgis s-anino Čečelínová.

Posttagmeze, sub la faka gvido de direktoro F. Purš, ekskurso gvidis nin al Roudnice n/Labem (bildgalerio kaj malnova preĝejo) kaj sur la legendecan monton Říp. Al ĉiuj plaĉis la tuta aranĝo favorata de escepte bela vetero.

-jm-

Esperantista klubo en Jablonec aranĝis renkontiĝon okaze de sia IV-a datreveno de Kluba fondiĝo E gastoj venis de kelkaj lokoj, el Praha venis 3 s-anoj. La vespero estis tre gaja kaj vere sukcesa.

L. Kynčl

POLA ESPERANTISTO
HAVEBLAS en la vendejo de PNS,
Na Příkopě. /Po 2,50.

Ni praktiku lingvon.

Ni kontaktiĝu internacie pli ofte.

Preskaŭ ĉiu homo, kiu komencas lerni la internacian lingvon, pensas pri ĝia baldaŭa uzo. Komencaj stadioj estas en kluboj, korespondado aŭ landaj renkontiĝoj. Sed la gepatra lingvo altrudas sin tuj, kiam mankas necesaj vortoj.

Estas do utile kontakti persone kun eksterlandanoj, ĉar la diverseco de la lingvoj devigas nin paroli Esperante. Jam post kelkaj tagoj vi sperte la influon de la divesnacieco. Veturante eksterlanden ni gajnas krom la lingvaj sperte novajn sciojn, pri urboj kaj pejzaĝoj, pri vivo de la loĝantoj ks.

Vojaĝinte ĉi-somere en Pollandon, kien mi estis invitata, mi ne sciis, kiel mi estos akceptita ĉe persone nekonataj miaj korespondantoj, sed post dudekkvartaga estado en diversaj lokoj mi estis pli ol kontenta.

La amika gastemeco estis modela kaj la rilatoj kun la popolo amika.

Unue mi veturis al la nordorienta urbo Olsztyn, kie mi ĝuis dek tagojn inter esperantistoj. Tri tagojn mi dediĉis al historiaj – partoj de la urbo kaj al bela romantika ĉirkaŭaĵo kun lagoj, kies akvo estas pura, sed iom malvarma. Al la urbo gvidas kelkaj elstaraj konstruaĵoj, nome urbodomo, katedralo kaj enirtutoj kun fortikaj muroj kaj kastelo, ĉio servanta dum la mezerko kiel fortikaĵo. Konata astronomo Nikolao Kopernik tie mem gvidis la defendon de la urbo kontraŭ svedaj atakantoj. Sur la malnova urba placo estas domoj, dum lasta milito detruitaj estis reparitaj aŭ nove konstruitaj laŭ malnova stilo.

La trian tagon mi vizitis E-klubon, kie laŭ vortoj de la kluba prezidanto, mi estis la unua ĉeĥo, kiu ĝin vizitis. Li elektis min kiel unuan, el tri eksterlandanoj ke mi parolu. La ĉefan aprton de mia parolado mi dediĉis al E-movado en Ĉeĥoslovakio nuntempe kaj en pasintaj tempoj. Mi invitis la ĉeestantojn al niaj aranĝoj, enlandaj renkontiĝoj kaj tendaroj. Poste mi menciis nian ĉeĥan historion kaj Johano Amos Komenský, kiu vivis ankaŭ en Leszno. Kvankam ĉeestis multaj komencantoj kaj sendube eĉ neesperantistoj, en salono regis dum mia parolo silento.

Kvankam multaj gesamideanoj estas dum somero forestantaj, tamen la klubejo estis plena. Tion mi ekkomprenis pli poste, kiam mi vidis anoncon en gazeto, „Gazeta Olsztynska“ pri mia alveturo.

Unu el la plej belaj ekskursoj okazis al Mazuraj Lagoj, kie oni povas vidi kormoranojn, cikoniojn kaj multajn aliajn kaj akvajn birdojn. De Gyszicko ĝis Nikolajka daŭris la ŝipveturo tri horojn. Poste tra Malborg mi venis al Tri urboj – Gdańsk, Sopot kaj Gdynia, ligita per trajnoj regule veturantaj. Gdańsk, malnova fortikaĵo kun multajvidindaĵoj, Sopot kun maro kaj belvida turo kun teleskopoj kaj Gdynia kun moderna haveno kaj novaj kvartaloj.

Poste de Balta maro kaj Oliva mi vizitis Poznań, universitatan urbon Toruń, Wrocław, Restantajn tagojn de mia pasport permeso mi dediĉis al Jelinia Góra, kie mi jam trovis miajn kontajn geamikojn.

Laďa Kynčl

RIDO DE PRASAMIDEANOJ

La pirato – Kajeroj por satiro, Humoro kaj Libereco... relativa junio 1933:

- Ĉefafero estas ridi. Ne gravas, je kies kostoj.

Popolo, kiu ne kuraĝas moki pri si mem, ne estas matura.

La Vipo

Aŭgusto 1937:

Bildeto de l'Varsovia Jubilea kongreso.

- Vi estas negro?

- Jes. Kiel vi divenis tion?

- Ha tre simple. Laŭ via Esperanta elparolo.

Julie Šupichová mortis.

Julie Šupichová, faka instruistino e. p. honora membrino de UEA, EAĈSR, ĈEA k. a., pioniro de Esperanto, verkistino, multopa funkciulino, sukcesa edukistino, batalantino por paco, modesta, nobla virino, forpasis dimanĉon matene la 20-a de decembro 1970 per kvieta, silenta morto, tia, kia estis ŝia tuta vivo.

Ŝi naskiĝis la 27-a de januaro – 1884 en Studnice apud Náchod. En 1907, akirante abituriantan diplomon de porinstruista instituto, en Kladno, ŝi fariĝis instruistino kaj en 1920 faka instruistino. Ŝi instruis en Červený Kostelec, Hronov kaj en Praha. En 1930 – ŝi estis pro sia sanostato, antaŭ – tempe pensista.

Ŝi ellernis Esperanton en la jaro 1907 laŭ lernolibro de Theodor Čejka. Tiu ĉi jaro estas sendube la plej grava en ŝia vivo: Tiam ŝi konsekris sian vivon al Esperanto, al fervora, neniam laciĝanta laborado por la lingvo internacia, kiu iom post iom fariĝis la celo kaj la senco de ŝia vivo. La pionýra aktiveco de Julie Šupichová estas stampata de vasteco admirinda kaj energio neelĉerpebla. Oni bezonus plurajn paĝojn por citi nur devizoforme ĉiun el ŝiaj faroj.

Jam en 1909 ŝi aranĝis en Červený Kostelec ekspozicion pri Esperanto kaj fondis tie „Esperantan unuiĝon“. Tiuj faroj antaŭdestinis ŝin por multflanka agado de funkciulo: en 1910 ŝi fariĝis sekretario de la „Unua sinjorina ĉeĥa societo Esperantista“ kaj komitatano de Bohema Asocio Esperantista, dum jak post la unua milito ŝi gvidis en Praha rondeton de Esperantistinoj, en 1921 ŝi sekretariis la XIII-an Universalan kongreson de Esperanto en Praha, en 1922 ŝi prelegis en internacia konferenco de esperantistaj instruistoj, aranĝitaj de instituto de Jean-Jacques Rousseau en Ĝenevo. En 1923 ŝi estis nomita sekretariino de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Instituto kaj sambare ŝi fondis „Liberan Unuiĝon de junaj esperantistinoj.“ En jaro 1923 ŝi gvidis internacian virion kunvenon ĉe la XV-a U.K. en Nŭrnberg. Post sia grava malsaniĝo ŝi fondis en 1928 „Liberan unuiĝon de Esperanto-Amikaro“, kiu disiĝis nur en 1939 pro la germana landokupado. Delegitino de UEA ŝi estis de 1925, membro de Kuratoraro de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno 1949.

Tre riĉa kaj multflanka estis ŝia literatura aktiveco. Ŝi kunlaboris al sesdeko da ĉeĥaj kaj Esperanto gazetoj sur la kampoj de edukado, klerigo kaj propagando de Esperanto, sub pseŭdonimoj kaj mallongigoj J. M. Studnická, K. Dubická, U-i, Ejš, Ješa, Š-á k. a.

Plej konataj estas ŝiaj kursore Esperanto en multaj gazetoj. Ankoraŭ nun oni renkontas homojn, kiuj danke rememoras ekz. ŝian kurson en la junulara revuo „Malý čtenář“. Proprakoste ŝi eldonis tri jarkolektojn de gazeto „Esperantský zpravodaj (1920-23). Sub la impreso de grava minaco al ŝia patrujo flanke de la Hitlerista regno ŝi eldonis anonime en 1938 flugfolion „Alvoko al la tutmondo“. El 26 ŝiaj publikaĵoj la plej gravaj estas „Lernolibro de Esperanto (ĉeĥa en kvin eldonoj), Esperanto a jeho význam pro národní školu“ Esperanto, ĝiaj evoluo kaj signifo por la elementa lernejo“ kaj „Kdo je Zamenhof (Kiu estas Zamenhof), la lasta eldonita de Orbis. En la postlasaĵo estas sep pretaj manuskriptoj de aliaj libroj.

Elstara estas ankaŭ la vasta prelega agado de Julie Šupichová en Praha, en la kamparo kaj en la Rado, precipe por la virinoj. Krom unuopaj paroladoj ŝi efektivigis sep prelego-ciklojn.

Pro siaj meritoj ŝi estis nomita honora membro de UEA (1993), EAĈSR, ĈEA, Sdružení přátel esperanta en Praha kaj en Červený Kostelec, kiun ŝi fondis, de Esperantista Societo „Komenský“ en Ostrava-Zábřeh kaj en Esperantista klubo en Praha.

Julie Šupichová estas neatingebla fenomeno de entuziasma, ekzemplodona, formika laborado por la ideo de la internacia lingvo kaj por bono de la homa socio. Ŝia vivoverko estas brila enkorpiĝo de la esperantista devizo! Ni fosu nian sulkon!

La mortintino enskribiĝis neforviŝeble, per oraj literoj, en la korojn de la esperantistoj kaj same en la historion de la Ĉeĥoslovaka kaj tutmondan Esperanto-movadoj.

La morto de Julie Šupichová signifas gravan perdon por la esperantistaro kaj elvokas sinceran funebron.

Honoro al ŝia memoro!

Jaroslav Mařík

Ni rememoras Theodor Čejka

Theodor R. Čejka, pioniro de Esperanto en ĉeĥaj landoj, naskiĝis la 10-a de januaro 1878 en Holešov kaj forpasis la 26-an de novembro 1957 en Bystřice pod Hostýnem, kie li instruadis en popollernejo plenan kvarjadekon.

Pri Esperanto Čejka unuafoje eksciis de ruso Ivan Ŝetalov, kiu sendis al li malgrandan lernolibron de Esperanto kun vortareto germana-esperanta.

Al Čejka Esperanto tuk ekplaĉis; ne nur pro ties simpleco kaj helsoneco – sed precipe por la nobla humana ideo, kiu celas al kunlaboradon, fratecon kaj pacon inter la nacioj de la tuta mondo.

La poresperanta agado, kiun Čejka aŭ individue aŭ kun siaj kunlaborantoj faris en la unua dekjaro de tiu ĉi jarcento estas mirinda kaj preskaŭ nekredebla. Dum ĉi tiu relative mallonga periodo li eldonis pli ol dudekon da diversaj esperantaj libroj, vortaroj, gazetoj kaj propagandiloj. Plej grava estis „Mezinárodní řeč Esperanto, úplná mluvnice a cvičebnice se slovníčkem esperantsko-českým a česko-esperantským. Dle autora Dra L. Zamenhova ve Varšavě sestavili Čejka Theodor, Bilík Valentin, Holub Jan“.

La lernolibro aperis en la jaro 1900; ĝi estis 188-paĝa kaj kreis solidan fundamenton por ellernado de Esperanto por ĉeĥoj.

Jam en la jaro 1902 Ĉejka lanĉis la eldonadon de esperantaj gazetoj, mirinde tri gazetoj samtempe! Ili estis: Revuo internacia kun aldonoj Bohema Esperantisto kaj Germana esperantisto.

En la jaro 1908 li komencis eldonadi la gazeton Internacia Pedagogia Revuo, kie ĉefredaktoro estis Ĉejka kaj ĉefaj kunlaborantoj Heřman Alferi kaj ruso – Roman Frenkel.

Al plej fervoraj kunlaborantoj de Ĉejka apartenis tuta plejado da moraviaj instruistoj, precipe Jan Holub, Valentin Bilík, Frant. Šídlo, Matouš Daniček kaj la plej entuziasma kaj dirigenta Josef Krumpholc, pli poste elstara kaj famkonata komeniologio kies centjaran datrevenon de naskiĝo ni rememoris ĉi jare. Tiamaniere – Bystřice pod Hostýnem, malgranda moravia urbo fakte estiĝis vera lulilo de Esperanto en ĉeĥaj landoj.

Theodor Ĉejka estis eksterordinara bonega instruisto kaj pedagogo, kiu ĉiam klopodis akcenti precipe la edukadon de la karaktero kaj juĝkapadlon de lernantoj; per sia laboro kaj konduto li estis vera model opor siajn lernantojn, eĉ por la civitanoj. Li estis viro absolute modesta, sed principe progresema demokrato kaj socialisto. Liaj konoj pri la nacia kaj monda literaturoj, arto, muziko kaj aliaj kulturaj atingoj estis eksterordinare vastaj. Krome por Esperanto li kun intereso kaj fervore laboris en urba konsilantaro, skolta kaj kooperativa movadoj, iniciatis modelan urban bibliotekon, agadis ekspoziciojn de ĝardenfruktoj, ktp.

Theodor Ĉejka forpasis antaŭ dektri jaroj; sed lia granda verko kaj klopodo poresperanta estas vivantaj. Ni Ĉeĥoslovakaj esperantistoj heredis lian testamenton.

Estas nia devo kaj honoro porti la verdan standardon ĝis la fina venko.

Jaroslav Tomčík

.....

Kun granda doloro

ni anoncas, ke en Brno mortis longjara Esperantistino, sinjorino Milada Vondroušková, aktiva membro de EK en Brno, edzino de Josef Vondroušek, membro de C. K. de ĈEA kaj fama tradukanto. Ni sincere kondolencas al ilia familio kaj al geklubanoj.

EK en Praha

.....

Mortis en januaro 1971 Jan Mráz en domo de pensiuloj en Černošice, kie li travivis lastajn horojn. Jan Mráz estis membro de la Klubo. Sinceran kondolencon al lia familio.

EK en Praha

SILVESTRA VESPERO 1970 EN E-KLUBO PRAHA.

Humuro estas kara kaj grandvalora spico precipe nun en moderna streĉa tempo. Estus domaĝo, se ĝi elvaporigus senprofite. Pri tio mi pensas, rememorante nian kluban silvestran vesperon, kiun aranĝis s-ano Slanina en stilo de konataj televidaj „H“ interparoloj“. Same kiel aktoro Horníček, li sciis de la unua momento per enkondukaj vortoj krei la ĝustan atmosferon-eĉ kun glaso da vino-(nur Svitáček mankis).

Liaj spritaj ŝercoj, sentencoj kaj rimarkoj estis interrompitaj per salvoj de rido kaj aplaŭdo.

Kun serioza mieno li malfermis la leterojn (ŝajnevenintaj) eĉ el Usono, ilin legis kaj responde komentis. Same li respondis demandojn el publiko. Jen kelkaj ekzemploj.

Antaŭparolo:

Se en televido estas interparoloj kun Horníček, kial ne povus esti en nia klubo paroloj kun Slanina. Depost hodiaŭ krom Ho-interparoloj estos So-interparoloj. Pardonu nur, mi ne estas aktora aktoro kiel Horníček nek profesia aktoro kiel Höger. Sed mi ne vola sen tiu ĉi rilato havi monopolon. Povas elkreski Bo-interparoloj (Bartošík), Hor-interparoloj (dr. Horský), Fo-interparoloj – ne ŝanĝu per fi-paroloj! (ing. Felix).

Karaj invititoj kaj invititinoj! Tie kaj ĉi tie-vi aŭdas la esprimriĉecon de Esperanto-mi havas sur la tablo leerojn, kiuj mi ricevis. En la leteroj estas demandoj, kiujn mi volas respondi.

Ankaŭ inter vi estas kelkaj, kiuj certe la demandojn jam havas preparitajn. – Do ni komencu.

1.) Jen skribas al mi Mondem esperantistino el Usono: „Mi opinias, ke esperantistoj estas tre filozofiemaj, filologaj kaj moralemaj“.

Respondo: Nu dependas, kiel oni rigardas la demandon: ĉu filozofie, ĉu filologe, ĉu moraleme. – Ni komencu per filozofio: la maljunuloj filozofe moraligas nur pro tiu fakto, ke ili mem ne povas peki. (vidu biografion de sanktuloj). Kaj nun ni venu al filologio. Parto de esperantistoj venis al Esperanto pro malsukceso de alia-nacia lingvo, do ili kulturigas filologion. Junaj esperantistoj filon-logas, sed ili ne filologas!

2.) Japana samideano Nabuko demandas: „Ĉu vi estas juna?“

Respondo: Tio ĉi estas relativa. Laŭ la aĝo junaj homoj estas ofte maljunaj laŭ spertoj, - kompreneble amaj! – kaj male: maljuna homo (tio estas mi) laŭ spertoj, estas juna-(naiva). Laŭ tiu ĉi dilemo ĉiuj esperantistoj estas junaj, ĉar ili estas naivaj – (kvalito de idealistoj)-.

3.) Jen demandas iu indiferentko: Kiom da tempo oni bezonas por ellerni Esperanton?

Respondo: Al tiu ĉi homo mi devas respondi leter en spatra lingvo. Nur por informi vin: estas homoj, kiuj ĝin parolas post dekkvar tagoj, aliaj kiuj Esperanton ne parolas eĉ post dek jaroj kaj estas homoj eternaj komencantoj. Ili ne parolas, sed krokodilas kaj aŭdu. Esperanto estas viva lingvo, ĉar ĝi jam havas unuan internacian idiotismon: „krokodili“.

Demando el publiko: Ĉu Esperanto estas danco?

Respondo: Jes kaj ne. Esperantistoj ĉiam dancas inter realismo kaj idealismo kaj se ekzistas Esperanto-ĉokolado, Esperanto-cigaretoj, Esperanto stratoj, Esperanto-tendaro eĉ Esperanto monumentoj (tio ŝokas min ĉar monumentojn oni konstruas al mortintoj)!, kial do ne povas ekzisti Esperanto-danco? Mi nur timas, ke tiu fabrikisto produktos Esperanto-kloset papero. Tio estus granda, - granda armilo kontraŭ nin!!!

Demando: Kiel oni dancas Esperanto dancon?

Respondo: Simple. Muziko ludas kaj eseprantistoj sidas babilante (aŭ krokodilante) pri nia kara lingvo, pri ĝia facileco kaj praktikeco.

Demando: Ĉu ekzistas homoj, kiuj konas cent lingvojn?

Respondo: Jes. Mi mem konas ĉirkaŭ 150 lingvojn, sed ilin ne scipovas. Neniu perfekte regas eĉ sian gepatran lingvon, despli la alian. Tio estas fanfaronado. Mi ankoraŭ tian fenomenon ulon ne renkontis. Mian kurson partoprenis maljuna trideklingva lernantino.

Sed ŝi dum esploro ne kapalis traduki en japanan lingvon la frazon: „Ĉu oni povas doni bovan furaĝon al porko? Jak nun mi petas: jen laŭvorta traduko de la frazo:

Kiel vi fartas? El angla: Kiel vi faras tion?

El germana: Kiel a lvi iras?

El ĉeĥa: Kiel vi havas vin?

Tio estas nur malgranda ekzemplo. Tial ankaŭ UNESKO havas multajn kunvenojn, kiuj nenion solvas. (diris Lapenna)

Demando: Kio estas amo?

Respondo: Feliĉe mi havas ilustritan plenan vortaron kaj tie mi trovis verbon „ami“: ĝi estas transitiva, signifas havi inklinojn al iu, ŝati kare iun. „Li amas tiun ĉi knabinon pro ŝia beleco kaj boneco“, diris Zamenhof. Do laŭ tiu ĉi deklaro amo, ami estas komercaj vortoj, (ion por io-) „Se vi amos min“ Amu min, ĉar mi amas vin!!! „Do vi vidas, - pli logie – aŭdas ke amo estas interŝanĝa negoca objekto inter viro kaj virino. Amo senpostulema ne ekzistas – nur tiu patrino-. Eĉ religia amo! Homoj preĝas por ion ricevi de la bona Dio. La politikistoj „amas“ poklon por ricevi postenon en regado, do amo estas hypokrita vorto.

S-ano Slanina interalie diris, ke li en sia aĝo prefere preĝu ol amuzi kaj amuziĝi. Sed per programo li montris sian spiritan junech. Lia humuro sur alta nivelo nin amuzis kaj montris, ke ankaŭ Esperantistoj povas esti gajaj ne nur „filozofiemaj“.

Sekvinda ideo por aliaj kluboj eĉ eksterlandaj.

Mag. PhMr. L. Plaňanská

BULTENO de Esperantista Klubo en Praha – loka grupo de Ĉeĥa E-Asocio.

Trimonata organo de la Klubo- redakta komitato: Inĝ. Eduard Felix, Oldřich Kníchal, Jaroslav Mařík.

Adreso: Esperantista Klubo en Praha – loka grupo de ĈEA, poŝtkesto 1069, Praha 1, Ĉeĥoslovakio
